Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 23 – 26 novembro**

# Migranta Hirundo

**23-a de novembro 2023, numero 3**

**Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova**

## Malfermo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto

Antaŭiras la malfermon etosa filmeto pri Torino, vekante nostalgion pri la ĉi-jara ĉeesta UK.

Fernando Maia, kiu tradicie gvidas la malfermon ĉi-foje multe parolis… pri amo. Ke ni almenaŭ kadre de la VK estimu kaj subtenu unu la alian, evitu kverelojn: “Estas tio, kion bezonas la mondo nun – amo”. Unueco nia ne signifas monotonecon, sed kunlaboron.





La prezidanto de UEA, Duncan Charters, parolis pri avantaĝoj, kiujn donas la Virtuala Kongreso, kiel ankoraŭ unu ero de granda laboro de UEA. Li ankaŭ invitis ĉiujn spektantojn partopreni la Strategian Planadon.




Ankaŭ Duncan vokis ĉiujn viziti la unuan UK en Afriko: “Multaj el vi pripensas Tanzanion, sed ni ne nur pripensu, ni iru”. Ĉar ne nur por subteni Esperanton kaj la movadon el Afriko tio indas, sed ankaŭ por akiri vere unikan kaj neforgeseblan sperton.

Kiel gvidanta fadeno tra la tuta malfermo teksis sin la ideo, ke malgraŭ tio, ke feliĉe ni denove povas renkontiĝi reale kaj brakumi unu la alian, admirante karajn vizaĝojn de Esperantujo (kaj, laŭvoje, ankaŭ vidindaĵojn de la kongresa lando), – tamen ja akirita de ni dank’ al malfacilaĵoj, dank’ al problemoj, sperto renkontiĝi virtuale ne malpli gravas. Aparte klare kaj strukture tiun ideon prezentis vicprezidanto de TEJO Snehaĝa Venkateŝ, ŝi substrekis, ke ĝuste virtualaj renkontiĝoj donacas la trezorojn de Esperanto mondo al tiuj, kiuj ne povas vojaĝi, ĉu pro financaj, ĉu pro sanaj, ĉu pro ideaj aŭ diversaj aliaj kialoj.




De ILEI la kongreson salutis Alessandra Madella. Ŝi parolis pri profundaj rilatoj inter UEA kaj ILEI, laŭdis la riĉan programon de la VK, kiu tute meritas esti kvartaga kaj aldonis sian voĉon al aliaj, varme invitantaj esperantistojn viziti la 109-an UK en Tanzanio.



Sekvis amuza sed kortuŝa preĝo verkita kaj legita de Probal Dasgupta kiel prezidanto de la Akademio de Esperanto.




Poste, Petro Baláž salutis la kongresanojn en la nomo de E@I, kiu denove gastigas la kongreson kaj zorgeme memorigis la detalojn de uzado de la sistemo Retevent.





Dank' al la temo de la 4-a VK "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj", la spektantojn atendis neordinara saluto de kontinentoj: salutantaj esperantistoj estas ĝuste tiaj enmigrintoj, kiuj trovis hejmon en aliaj landoj de aliaj kontinentoj. Ili iomete rakontis pri sia vivo en siaj novaj landoj-hejmoj. Tri el kvin prezentis sin sur fono de belega pejzaĝo, allogis varma mara vento, fajroj de pitoreska valo, ekzotikaj konstruaĵoj. Kvin kontinentoj, kvin diversaj vizaĝoj de la mondo.














En Afrikon la kongresanojn invitis kanto de Joel Muhire, kiun ni jam prezentis al vi, kaj kiu eligis aparte varmajn komentojn en la babilejo de la Malfermo.

La himno ĉi-jare sonis, plenumita de "Akordo" en sufiĉe klasika formo.



## Voĉdonu pri la ekzamenperiodoj de 2024

★ Katalin Kováts

En la novaĵo vi trovas informojn pri la ekzamenoj en 2023, kaj peton voĉdoni por la ekzamenperiodoj por 2024 kaj informojn kaj specimenon pri la novaj interagaj ekzercoj kaj testoj de edukado.net. Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=897

edukado.net

**Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net**

## Telegrame: Demando pri ĉifrovalutoj

★ KuboF Hromoslav

Karaj, en mia prelego pri ĉifrovalutoj estis iom multaj demandoj kaj mi preteravidis unu el ili. Pardonon! Do mi respondos ĝin ĉi tie.

**Demando:** Vi menciis ke la funkciado de mono de kreditkarto kaj ĉifromoneroj estas similaj. Bonvolu ekspliki aŭ komparu la karakterizaĵoj de Bitcoin kaj Nacia mono kiel la eŭro.

**Respondo:** Mia komparo inter fidata mono kaj ĉifrovalutoj celis kompari *uzadon*. Ekz. kiam oni pagas per kreditkarto, oni simple ĝin metas al sensilo en vendejo kaj tiel estas deprenata mono. Kvankam de teĥnika vidpunkto okazas multaj aferoj fone, kutima paganto perceptas nur tiun deprenon de mono post kontakto kun sensilo. Simile, kiam oni pagas per ĉifrovalutoj, kvankam foje okazas multaj aferoj, kutima paganto perceptas nur deprenon de mono post konfirmo de ĝiro. Kompreneble, pri la teĥnologio de kaj kartoj kaj ĉifrovalutoj eblus longe prelegi, sed tio ne estis la celo de la prelego.

## Juna amiko – unika kaj valora




Se estas unu revuo, kiu meritas pli grandan legantaron, tiu estas la revuo por junuloj kaj lernantoj eldonata de ILEI. Jam nun ekas la reabona momento por 2024. Kiu jam legas la revuon, nepre reabonu ĝin.

Kiu ne estas nun leganto, ni instigas vin, mendi la revuon por 2024 kaj post tio decidu ĉu daŭre aboni ĝin.

Pliaj detaloj: https://www.ilei.info/revuoj/index.php

**Patroniĝo en TEJO estas la plej bona maniero subteni la junularan Esperanto-movadon.**

Kiel Patrono, vi regule ricevos la oficialan komunikilon por Patronoj. Krome, vi ĝuos ĉiujn servojn kaj rajtojn, kiujn ankaŭ ricevas la membroj: la revuon Kontakto, rabaton al IJK kaj aliaj eventoj, eblon partopreni komisionojn kaj komitatkunsidojn. Atendu de ni ankaŭ poŝtkarton ĉe via hejmo por specialaj okazoj.


Por iĝi Patrono de TEJO, bonvolu en la reta aliĝilo de UEA, en la parto 3, alklaki PT—Patrono de TEJO.

# Duono de Mikaelo Bronŝtejn prezentis sin dum la 4-a VK



Verda Nihao

Dum la lastaj monatoj oni multe parolas pri la Artefarita Intelekto (AI) kaj aliaj teknologioj. Tamen sendube dume AI ne povas superi homan potencon kaj povon. Bona ekzemplo de tio estas la recitalo "pri amo kaj malamo", kiun prezentis... grandparte duono de Mikaelo Bronŝtejn. La nova teknologio estis testita kadre de la 4-a VK, ĵaŭde, la 23-an de novembro.



Fakte, kiam ni parolas pri io "nova", ofte temas pri io forgesita malnova. Mikaelo estas konata bardo kaj poeto, do, ne estis mirinde ke li uzis unikan teknologion dum la prezento. Li bezonas esti en kelkaj lokoj samtempe. Eĉ ne teknologion, sed kombinon de tre raraj teknologioj: ĉefe "duonismon", kiun la redakcia teamo tuje rekonis. Tamen Mikaelo arte ĵonglis per ĝi, faris kelkajn modifojn, kaj devojiĝis de la tradicia modelo de "duonismo": jen aperis preskaŭ plena vizaĝo de Mikaelo, jen 40, 60, 70 procentoj...

Ankaŭ la enhavo de la recitalo kaptas la atenton. Jen kiel protokolas ĝin speciala agentino, kiu sekvas la artkreadon de Mikaelo:

**Protokolo N 23/11/2023**

*Virtuala Kongreso, novembro 2023,*
Recitalo pri amo *kaj malamo*
*Mikaelo Bronŝtejn*

Salutis ĉiujn virinojn. Poste ĉiujn ĉeestantajn virinojn laŭnome. Poste ĉiujn ĉeestantojn.

Promesis kanti pri amo kaj malamo. Pri malamo kantis unu kanton, aliajn pri amo. Virinoj kunkantis kaj dancetis, eĉ mi, nu kion ja fari, se ĉiuj elektitaj kantoj estas la plej porvirinaj kantoj el lia tuta kantaro!

Interalie, krom du, ĉiuj aliaj elektitaj kantoj estis romantikaj, jes.

Pri unua amo, kiu ŝajnas sola kaj senfina (interalie mia ŝatata kanto de Mikaelo, mi la tutan tekston parkere kunkantis, bedaŭrinde oni malpermesis al ni ŝalti mikrofonojn!)

Pri eterna amo: "Kaj resentu, kaj reamu, kaj eternu..."

Pri kara amo-memoro "Sento fora restas kun mi, Anna-Maria, vi, sola vi..."

Pri amo aŭtuna: "Savos min konifera arbar' de turmentiĝ' triviala..."

Eĉ eterna, la plej konata (aparte inter ni, virinoj, jes) "Miaj amitaj amataj amotaj" estas malgraŭ ioma Kazanoveco tamen tre romantika: "Anstataŭ ol prudente kalvi, mi freŝajn rozojn portas al vi" kaj kunkantantaj virinoj ridetas milde, ankaŭ mi.

Adiaŭante Mikaelo mem ironias: pri siaj kantoj kaj eĉ foje libroj, kiujn plej ŝatas ĝuste virinoj, aparte la libron *Lecionoj por knabo*. Mia ŝatata, damne!

Poste adiaŭoj, virtualaj tuŝoj-kisoj, dufoje kun virinoj (nu ni ja kunkantis, laboris interalie), kaj fojon kun ĉiuj.

Sed estis etose, eĉ malgraŭ ke gitaro ne ĉiam aŭdeblis. Kunkanti al Mikaelo, kiam li kantas ion tiomgrade konatan, estas anime reveni al realaj renkontiĝoj, kie ni vere kantis kune. Reveni, nu… duone.

Konklude: indas daŭre sekvi la recitalojn kaj aliajn artaĵojn de Mikaelo Bronŝtejn. Kaj tiu ĉi kaptas apartan atenton, indas respekti ĝin!

La redakcio turnis sin al Mikaelo kun la demando: "Kio estas la esenco de via recitalo".
**"Amo" - li respondis.**

Vi povas esti aŭtoro de *Migranta Hirundo* kaj la *Reta Revuo*!
Por kontribui, skribu al la redakcio
revuo.esperanto@gmail.com